

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la pasintaj semajnoj ni komencis prezenton de la libro *Les Patries* [*La Patrioj*] verkita de **Jean Diedisheim**, aŭtoro konata de la mondfederalistoj. Tiu libro estas interesa komplemento al *Interpopola Konduto* de **Edmond Privat**, verko bone konata de la esperantista publiko.

A.- La pasintan semajnon ni tradukis al vi la komencon de la ĉapitro titolita *Kondiĉigo de la individuo*. En tiu teksto Jean Diedisheim konstatas, ke la sento pri patrio ne estas instinkta. Tiu nocio estas kulturata en la lernejo, familio, naciaj festoj kaj militdeĵoro. Li poste prezentis mitojn pri la karaktero de popoloj.

Cl.- Ni daŭrigas la tradukon de tiu ĉapitro. Per niaj buŝoj estas do Jean Diedisheim, kiu sin esprimas :

A.- « *Ĉe eliro de sia direktita edukado, kaj je aĝo de la plej vigla mensa aktiveco, junulo estas alvokita kaj dungita de Ŝtato por daŭro, kiu varias, sed neniam estis mallonga.*

Cl.- *Li tiam estas sisteme kondiĉata, por ke en li fortiĝu kaj firmiĝu la ligo, kiu lin ligas al la nacio. La nacio por tiu operacio kaj ceteraj agadoj ricevas la nomon Patrio.*

A.- *Kiel soldato li abrupte estas senpersonigita kaj vivas korpe kaj morale en komuneco kun multaj kamaradoj kondiĉitaj en la saman direkton.*

Cl.- *Li estas izolita en atmosfero, kie ĉio instruas, ke li servas Nacion, al kiu li ĉion ŝuldas kaj kiun li povas servi kontraŭ alia nacio, kiun oni devos tiam necese faligi.*

A.- *Cetere, tiu virtuala malamiko simple ne estas nekonato, iu algebra X. Antaŭ nelonge, almenaŭ sur franca ekzercejo, oficiro aŭ suboficira instruktoro ĝin tutsimple nomis **le boche** aŭ **le chleu**.*

Cl.- *Se la soldato iĝas aspiranto aŭ oficiro, tiam li ĝuas pri avantaĝoj agrablaj por la komforto kaj memamo.*

A.- *Pro natura korporaciemo sekvas ĉe li ŝato por la armeo kaj samtempe nova pliigo de la nacia sento.*

Cl.- *Tiu peza imposto, kiu premas ĉiun civitanon, tiu longdaŭra hipoteko en ĉies vivo je aĝo de maksimuma efiko kaŭzas novan psikan rezulton.*

A.- *Temos por la individuo pri subkonscia serĉado de pravigo al tiu ofero. Necesos, ke li malkovru ĝian kaŭzon, eĉ nur imagitan. Pro sekreta bezono ne esti plenuminta vanan agon, je liaj okuloj, la trovita kaŭzo devas pravigi la oferon.*

Cl.- *Tiu procezo apartenas al banala psikologio kaj neniel nuras al nia studobjekto. La trudita abnegacio fine generas emociigajn sentojn : ligiteco al la persono, grupo aŭ celo ne elektita.*

A.- *Kutime, estas vere, la procezo estas alia : idealo, alvoko, emociiga stimulilo igas la homon agi kaj sinoferi. Ofte okazas la kontraŭo – tio valoras por nia studobjekto - : devigata agi kaj peni, homo fine enamiĝas al la kaŭzo, kiu estis unue trudita al li.*

Cl.- *Natura por la individuo, tiu tendenco estas pliigita pro atavisma faktoro. La patro, la prapatroj estis subigitaj al la sama imposto kaj, krom esceptoj, estis kondukitaj al la samaj reagoj.*

A.- Nu, se la militdeĵora tempo plifortigis la nacian senton, je kia intenseco kreskos tiu sento ĉe tiuj, kiuj, post la deĵora aflikto, konatiĝos kun la fajra aflikto ? Ni pensu pri milionoj da viroj, kiuj longe oferadis sian vivon, kiuj konis senfinajn dolorojn kaj malagrablajn, kiuj suferis en sia korpo kaj en sia spirito, kies karno estis disŝirita aŭ kies membroj estis tranĉitaj !

Cl.- Kiel la homa naturo, miksaĵo de instinkto kaj racio, povus elteni tiun turmenton sen trovi por ĝi signifon ?

A.- Je tiu nivelo daŭre postulita sinofero pro trudita kaŭzo kondukas al sublimigo de tiu kaŭzo ĉe ties servantoj kaj vunditoj.

Cl.- **Renan** skribis : « Oni amas en proporcio kun la oferoj konsentitaj, la dolorojn suferitajn. »

A.- Jean Diedisheim citas ekzemplojn : La plej ruĝa socialisto post la suferoj en la fronto fariĝas ofte tiu nepersona patrioto, kiu enviciĝas en la defiladoj de batalintoj. Li poste citas leteron skribita en 1916 de fervora patrioto, kiu distingiĝis pro sia persistemo kaj kuraĝo kaj kiu estis mortigita en majo 1918. Post plendo pri malnoblaĵoj okazintaj en la ariero, tiu juna soldato estis skribinta :

Cl.- « Ve ! se estus nur por tio, ke oni luktas, por tiuj fiuloj, estus kaŭzo forĵeti la armilojn... Sed la Patrio, la Lando, tio akiras signifon, tio fariĝas supera realaĵo, kiam oni vidis tiom da sango flui pro ĝi, tiom da amikoj kuŝi kun vizaĝo al tero aŭ okuloj al steloj, por ĉiam senmovaj en la malbelegaj sulkoj fositaj de la milita plugilo, por kia rikolto ? »

A.- Jean Diedisheim aldonas : Nete patrio kaj ties granda fondiĝas tie sur la valoro de la al ĝi oferataj vivoj. Sed, post sia amkonfeso la batalinto ekflustris dubon : « ... por kia rikolto ? » Korŝira demando, kiu ŝprucas el fulmo de racio pri la malfekundeco de la oferado al la idolo Baal, aŭ kontraŭe el tiom firma fido, ke ĝi malŝatas cerbumi pri misteroj.

A.- En la fino de tiu ĉapitro Jean Diedisheim montras, ke la patrio ne ofertas elekton al la junuloj. Ĝi trudas al ili la superan oferon. Kaj li konkludas citante **Jean Guehenno**.

Cl.- Kuraĝa humanisto kaj kuraĝa batalinto, **Jean Guehenno** ne timis skribi tion pri la spiritostato de soldato, kiu kondamnas la militon en la tempo, kiam li ĝin faras, kaj bone faras :

Cl.- « Pli klara penso, pli firma koro estus rifuzintaj servi. Tio tiam estus signifinta nepran morton. Jen kion mi ne volis. Mi sekvis la ŝafaron. »

A.- Jean Diedisheim konkludas : *Kiom da homoj pensis same kaj ne kuraĝis ĝin esprimi?* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-